Kongresa numero 4.

„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria** „Kuraĝe antaŭen!“

Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, postgebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. **Leteradreso:** Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

Nro 4 (129 en la vico) | Korneuburg ĉe Wien, la 5. de aprilo 1936. | 13. jaro

Represo kaj traduko deziratajn, kondiĉe, ke oni sendu 2 pruv-ekzemplerojn al nia redakcio.

La Prezidanto de „Paneŭropa Unio“, grafo Coudenhove-Kalergi, donas al nia dispono ĉi-suban artikolon, kiun ni publikigas kun tiom pli granda volonteco, ĉar gia enhavo koincidas kun la programo de nia Somera Universitato. „Paneŭropa Unio“ estos ĉe la Somera Universitato reprezentata.

La Red.

Danuba Federacio.

De R. N. Coudenhove-Kalergi.

Depost la disfalo de Danubo-monarhio (Aŭstrio-Hungarujo) plimultiĝas la voĉoj, kiuj postulas federacian kuniĝon de la landoj ĉe Danubo pro neceseco ekonomia kaj politika. Rigardo al la landkarto montras, ke tiu ĉi postulo estas prava. Ĉar la mondo tendencas unuiĝi en ĉiam pli grandaj komunumoj politikaj kaj ekonomiaj, konforme al la kreskanta plirapidiĝo kaj plimultiĝo de la trafikiloj.

El ĉi tiu perspektivo la disigo de la malnova Danubo-regno estis kontraŭa al la ĝenerala tendenco de la historio. Sed de la nuna vidpunkto la novordigo konformiĝis al la Eŭropa evoluo kaj al la postulo, ke ĉiu Eŭropa popolo bezonas nacian ŝtaton kiel kulturan kristaliĝilon.

Nun la novaj naciaj ŝtatoj en meza kaj orienta Eŭropo estas faktoj historiaj kaj politikaj. Neniu prudenta homo volus returni tiun ĉi evoluon kaj restarigi la Danubo-ŝtaton en ĝia malnova formo. Sed ĉiuj prudentaj homoj konsentas, ke la disiĝinteco de la Danuba monarhio estas kompletigenda per federacia unuiĝo de la novaj Danubo-ŝtatoj; tiel pro kialoj politikaj kiel pro kialoj ekonomiaj kaj kulturaj.

Ĉar Danubujo *) limiĝas kontraŭ tri grandŝtatoj: Ruslando, Germanlando kaj Italujo. Ĉiu el tiuj ĉi ŝtategoj klopodas akiri la decidan influon en Danubujo. Ne nuligita Danub-Eŭropo nepre fariĝus interbatalejo por la kontraŭtendencoj de la nomitaj tri grandpotencoj. Danubujo tiam estus renkonte al simile tragika sorto kiel Italujo en la tempo de la Renesanco aŭ Germanlando dum la tridekjara milito, kiam sur itala tero Hispanujo kaj Francujo interbatalis pro la Eŭropa hegemonio, sur germana tero Habsburg kaj Bourbon.

Tial jam la Eŭropa pacintereso postulas la intiman unuiĝon de la landoj ĉe Danubo en ŝtata federacio. Kaj tial estas la devo de ĉiuj ŝtatistoj de la nomita teritorio, aktive kunlabori por la efektivigo de tiu ĉi plano.

* * *

La ekonomia postulo de Danub-Eŭropo estas egale forta kiel la politika. Ĉar laŭ



ekonomia vidpunkto estas la devo de la registaroj certigi kaj plibonigi la vivonivelon de siaj ŝtatanoj.

Tio ne estas ebla en tiaj malgrandaj teritorioj, kiaj estas interne de la ŝtatoj ĉe Danubo. Ĉiu provo, tie ĉi atingi nacian aŭtarkion, komenciĝas kun oferegoj kaj finiĝas en katastrofoj.

Kompreneble, kompare al la grandaj ekonomi-teritorioj de la nuntempo, tuta Danubujo estas nur malgranda vivospaco. Tial, laŭ ekonomia konsidero, ĝi povus esti nur etapo sur la vojo al Tuteŭropa ekonomipolitiko. Sed ĉie en la vivo oni devas komenci kun malgrandaj aferoj por atingi ion grandan.

Por konstrui la Eŭropan ekonomi-komunon, oni devas komenci kun la kunigo de la plej malgrandaj ŝtatoj, kiuj plej multe suferas pro la diseco.

Tial la ekomonia unuigo de Eŭropo devas komenci en Danubujo.

* * *

Sed la popoloj de la Danuba teritorio havas ne nur politikan kaj ekonomian, sed samtempe ankaŭ kulturan mision.

Ĉar la novaj ŝtatoj ne estas pure naciaj. La plej multaj el ili entenas fortajn naciajn malplimultojn, kiuj laŭkulture simpatias kun siaj samnaciaj najbarŝtatoj.

Tiu ĉi stato povas konduki aŭ al daŭraj konfliktoj aŭ al daŭra interkonsento. Tiuj ĉi malplimultoj povas esti aŭ abismoj aŭ pontoj inter la ŝtatoj ĉe Danubo.

La respondo al tiu ĉi sortodemando dependas de la traktado de la malplimultoj flanke de la plimultoj, t. e. de tio, kiel oni traktas la nacian principon en Danub-Eŭropo. Ĉar tie ĉi la demando pri la malplimultoj estas komuna kaj reciproka. Oni de neniu ŝtato povas postuli, ke ĝi permesu egalajn rajtojn al siaj malplimultoj, dum la samnacianoj de tiuj ĉi malplimultoj subpremas trans la ŝtatlimoj la samnacianojn de ĝia propra plimulto.

Kiu praktike volas entrepreni la unuigon de la Danuba teritorio, devas samtampe konsideri ĉi tiujn tri aspektojn de la problemo: la politikan, la ekonomian kaj la kulturan. Ĉar ĉi tiu problemo estas tridimensia kaj ne permesas solvojn unudimensiajn aŭ dudimensiajn.

La paco ĉe Danubo kaj la ekonomia evoluo de la Danubo-popoloj estas intime ligitaj kun la kultura egalrajteco de la malplimultoj kaj kun reĝimo de nacia toleremo laŭ la modelo de Svisujo.

*) Danubujo (germane „Donauraum“) = la ekonomie-geografia teritorio de la landoj ĉe Danubo.

Aŭstria Ligohimno

De O. Kernstock; trad. prof. d-ro H. Ellinger kaj A. Berndl.

Hejma tero, daŭran benon
Havu vi per Di'-favor'!
Belornamas la terenon
Verd' abia spika or'.
Am' germana, korfidela,
Kaj germana energi' — —
Patroland', vi estas bela,
Dio ŝirmu vin, Aŭstri'!

Ne despoto, ne sklavuloj!
Ĉiuj ni sub sama jur' —
Voj' libera por taŭguloj,
Por scienco kaj kultur'!
Nur antaŭen vi aspiru,
Sortobatojn venku vi!
Al feliĉo supren iru!
Dio ŝirmu vin, Aŭstri'!

„Oriento" *) vi nomiĝas —
Kaj de tie venas lum'.
Nokt', malhelo disŝiriĝas,
Se tra l'nuboj brilas lum'.
Kun vizaĝo plenespera,
Nun antaŭen vidu vi!
Land' de l' lumo, land' libera,
Dio ŝirmu vin, Aŭstri'!

Firme marŝu ni senlace
Al la cel' en unu front'!
Ni laboru ĉiam pace
Por la savo de l' estont'!
Forta kiel patroj estu
Nia jun-generaci'!
Hejma ter', benata restu!
Dio ŝirmu vin, Aŭstri'!

*) La nomo „Oesterreich" = „Aŭstrio" devenas de la malnovgermana vorto „Ostarichi", kiu signifas „orienta lando".

Kial Esperanto?

De Mr. Fr. Höfert, 1. viceprez. de E.-Asocio en Ĉeĥoslovakio, Znaim.

La mondo estas plena de malfido kaj envio kaj malamo; malfidon, envion kaj malamon predikas al la nacioj ne pririspondaj demagogoj, politikistoj, redaktistoj kaj sekretarioj; ankaŭ gazetoj, aĉetitaj de akciuloj de la armil-industrio, agitaĉas — kaj la nepensanta popolo, kiu ne konas la alinacianojn kaj alilandanojn, kompreneble kredas, kion ĝi legis kaj aŭdis en kunvenoj. El tio sekvas: post malmultaj jaroj la homoj denove ŝanceliĝos en novan militon, kiel ili — ĝin nevolinte — enŝanceliĝis en 1914. Sed la estonta milito estos multe pli terura, multe pli malhumana; pli multaj homoj dum ĝi mortos, pli multaj revenos kiel neresanigeblaj kripluloj., pli multaj eĉ ne revidos sian nutrinton kaj la mizero kaj senlaboreco estos ankoraŭ pli kruelaj ol ili fariĝis pro la lasta milito kaj ties malfeliĉaj sekvoj.

Sed, se la homoj estos eksciintaj, ke ankaŭ inter la aliaj nacioj kaj ŝtatoj estas sinceraj pacamantoj, la fido kaj kontento kaj amo al la proksimulo revenos; venos la paco, ne revenos amas-buĉado kiel dum 1914—1918, sed estus laboro kaj pano kaj paradizo en la mondo.

Estu nia klopodado, karaj gesamideanoj, ke inter la nacioj interkonatiĝu, por ke la pacamantoj en la tuta mondo trovu sin reciproke!

Do: kial Esperanto? Por la paco kaj bonfarto de ĉiuj homoj, kiuj deziras la bonon!

Protektoro: Federacia Prezidanto de Aŭstrio.

Kongresejo: La salonegoj de iama imperiestra kastelo en Wien, Neue Burg.

Leter-kaj telegramadreso: Esperanto, Wien, Hofburg.

Kongreskotizoj:

Favorkotizoj, **validaj ĝis 30. de aprilo:**

I. Kongresano sv. fr. 23.—
II. Kotizo por familianoj de kongresano sv. fr. 14.25
III. Kotizo por gejunuloj malpli ol 18-jaraj sv. fr. 9.50

Favorkotizoj, **validaj ĝis 30. de junio:** I. sv. fr. 25.50, II. sv. fr. 16.—, III. sv. fr. 10.80.

Helpkongresanoj, kiuj ricevos ĉiujn dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton sv. fr. 12.—.

Pri **enpagmaniero** rigardu konkresnumeron I.

Brazila Ligo Esperantista, Rio de Janeiro informas nin, ke la registaro de Brazilo jam nomis sian oficialan reprezentanton por la 28-a, nome s-ron d-ron Roberto Mendes Goncalves, sekretario de Brazila ambasadorejo en Aŭstrio.

Kromaj rabatoj sur fervojoj:

Belgujo: sur fervojoj 35% rabato, konsentita kontraŭ transdono de rabatrajtigilo (havebla pere de Belga Ligo Esp., 19. Ave. Montjoie, Bruxelles) en la forirstacio aŭ en la enirstacio por Belgujo. Se vi ne postulos la kontraŭon, vi ricevos ir- kaj revenbiletojn, kiuj validos ĝis la fino de la kongreso. Se vi postulos nur simplan bileton, vi bezonos por la reveturo denove rabatrajtigilon je la limstacio. Kongreskarto, subskribita de la posedanto, necesas. Partoprenantoj, vojaĝantaj al Vieno tra Dover—Ostende, povos ricevi en la oficejo de „Continental Express Ltd. en Dover (Marine)" rabatitajn biletojn Dover—Hergenrath (landlimo) kaj revene, validaj 30 tagojn. Tiaj biletoj estas riceveblaj en la stacio Victoria en London kaj en la agentejoj de Continental Express en Anglujo kun jenaj rabatoj: Brita vojiro 33⅓%, Ostende—Dover 30%, Poll Tax ĝis Dover 50%, Belga fervojo 35%. Ankaŭ por tio la necesaj rabatkartoj estas riceveblaj ĉe Belga Ligo Esp., kontraŭ 1, resp. kup. por ĉiu rabatilo kun la necesaj informoj. Sen respondkupono nenia respondo. Dankon al Belga Ligo!

Rumanujo: Aktnumero 5864. R. A. 1936. Rabato sur la fervojoj validas de 4.—24. aŭg. jene: 1. fervojbileto por veturo al Wien oni pagu plenpreze; 2. oni posedu kongreskarton de 28-a. Nur baze de ĉi tiuj dokumentoj por reveturo biletoj kun 50% rabato por la sam[a] distanco estas aĉeteblaj. La alvetura bileto [de]devas esti aĉetata antaŭ la 1. de aŭg. — Int[er]rompo de la veturado malpermesata. Dank[o] al Rumana E.:Asocio!

Programo:

(Litero „T" signifas ekskurson B, rest[o] en Wien, aparte pagota; la aliaj aranĝoj est[as] senpagaj por la kongresanoj.)

Sabate, 8. de aŭg.:

16 h Prepara kunsido de Komitato de UEA kun LKK.
T 18 h 30 vespermanĝo.
20 h **Inaŭguro** de la Kongreso en la Festsalonegoj de Imperiestra Kastelo [en] ĉeesto de la protektoro, de membroj [de] Honora Komitato, reprezentantoj de la ŝtatoj ktp.
Poste **Interkonatiĝa Vespero** en la sam[aj] salonegoj.

Dimanĉe, 9. de aŭg.:

9 h **Katolika Diservo.** Lia eminenc[o] moŝto, la **ĉefepiskopo de Wien, d-ro Theodor Innitzer,** longjara amiko [de] Esperanto, celebros la Pontifikan Meson sur Heldenplatz antaŭ la kongresejo. Polica granda orkestro ludos Germanan Meson de Schubert. Prediko en Esperanto. — Laŭtparoliloj disaŭdigos [la] Meson kaj la predikon. Je malbona vetero la Diservo okazos en Vot[iva] preĝejo.
10 h 30 **Protestanta Diservo** kun E.-prediko.
10 h 30 **Izraelida Diverso** kun E.-prediko.
T 12 h tagmanĝo.
T 13 h 30 **Ekskurso D:** per aŭtobusoj [al] iama imperiestra plezurkastelo Schönbrunn, vizito de la salonegaro aŭ de la bestĝardeno, la plej malnova en Eŭropo, poste de la belega parko kun ruinoj, statuoj kaj elrigardejoj.
T 17 h 30 reveturo al la urbo.
aŭ **Ekskurso E:**
T 13 h 30 per aŭtobusoj al Klosterneuburg, urbo proksima al Wien, vizito de la fama barokstila abatejo, poste de la bordbanejo ĉe Danubo, reveturo al la urbo.
T vespermanĝo antaŭ la teatro.
Pro la granda nombro de la kongresanoj [la] kvarono partoprenos en D aŭ E, la alia[j] du kvaronoj en **F:**
T 13 h 30 **Ekskurso F** per aŭtobusoj al [la] Kahlenberg, monteto kun bela panoramo al Wien kaj la Danubo-valo; restado, trinkado de kafo; daŭrigo de la veturado al surmonta kastelo Kobenzl kun bela panoramo al la alia parto de urbo Wien kaj de tie al Grinzing, fame konata pro sia bona vino. Ĉi tie en grandaj ĝardenoj vi aŭskultos muzikon, popolkantojn, vespermanĝos kaj trinkos bonan gutan da vino. Al alkohol-kontraŭuloj ni rekomendas partopreni dimanĉe en D kaj lunde en E anstataŭ F. Vino aparte pagota!
T Reveturo al la urbo je meznokto per aŭtobusoj.
20 h prezentado de la opereto **„La blanka ĉevaleto",** muziko de Ralph Benatzky, teksto de Hans Müller, kantoj Robert Tillberg. (Por ekskursoj D kaj E.)

Lunde, 10. de aŭg.:

9 h **Inaŭguro de Somera Universitato** sub la titolo **„Kulturaj kaj ekonomiaj problemoj de Eŭropo"** en Hofburg.
T 12 h tagmanĝo.
T 13 h 30 ekskursoj same D. E aŭ F kiel dimanĉe.; partoprenos ĉe D aŭ E, kiu

dimanĉe estis ĉe F kaj en F, kiuj estis en D aŭ E.

...arde, 11. de aŭg.:

8 h Diservo en Minoriten-preĝejo (aranĝata de IKUE).
9 h **Laborkunsido** en Festsalonego de Hofburg.
12 h akcepto en la urbdomo flanke de la urbestro.
13 h fotografado antaŭ la urbdomo.
13 h 30 tagmanĝo.
15 h vizito aŭ al la ĉambraro imperiestra en Hofburg aŭ al la imperiestra trezorejo.
16 h kunsido de Esperantista Akademio.
16 h Komitato de UEA.
16–18 h fakkunsidoj de
Internacia Katolika Unuiĝo Esp. en la festsalono de Schotten-abatejo.
Sanitaristoj (hospitala civila kaj miltista helpantaro), aranĝ. Josef Schäfer, Wien, 18. Weitlofgasse 15/21.
Senalkohola kaj sentabaka kulturo, adr. Walter Mudrak, Wien, 3. Beatrixgasse 19/9.
Stenografistoj, adr. Ernst Werner, Wien, 1. Neue Burg, Int. Isp.-Muzeo.
Veterinaroj, adr. d-ro Georgi pop Ivanov, Orehovo ĉe Danubo, Bulgarujo; ĉiuj en lernejo, ankoraŭ sciigota.
18 h 30 vespermanĝo.
20 h **Ekskurso G:** Veturado per aparta ŝipo sur Danubo dum 3 horoj kun muziko, kanto kaj danco (sv. fr. 1.20) **aŭ.**
20 h **Ekskurso H:** Veturado en grupoj al fama Prater kaj amuzado tie (karuseloj, glitejoj ktp.) sv. fr. 1.—.

...kredo, 12. de aŭg.:

9 h **Somera-Universitato en Hofburg.**
10 h fakkunsidoj de
Kristana Esperantista Ligo Intern., adr. Paul Hübner, Quedlinburg, Adolf Hitler Wall 94, Germanlando.
Bahaanoj, adr. Redakcio de „La Nova Tago", Fürth i. Bayern, Kriegerheimstraße 16/I.
Fervojista Ligo Esperantista, adr. Gottfried Heidl, Linz a. d. D., Waldeggstraße 52, Aŭstrio.
12 h 30 tagmanĝo.
14 h **Ekskurso I** (sv. fr. 2.10), rondveturado tra la urbo per aŭtobusoj.
16 h Komitato de UEA en lernejo
fakkunsidoj de
Jurnalistoj, adr. S. Grenkamp-Kornfeld, ĉefredaktoro de „Nia gazeto", 29 av. de la Victoire, Nice.
Tutmonda Asocio de geinstruistaj esperantistoj, adr. registara kons. lernejinspektoro Fritz Stengel, Wien, 1. Neue Burg (Int. Esp.-Muzeo).
Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio, adr. Esperanto-Kongreso, Wien.
Juristoj, adr. René Chapron, advok., 32 Rue de Champs, Le Mans, Franc.
18 h **„Konferenco de la virinoj"** en Festsalonego de Hofburg (vidu n-ron 3 de Kongresgazeto).

...ride, 13. de aŭg.:

Tuttagaj ekskursoj (Turisma Servo)
„ per aŭtobusoj al **Rax-alpo,** per kablofervojo al la supro (2000 m alta), belega panoramo, reveturado per kablo-fervojo, daŭrigo de la aŭtobusa veturado al Semering (1009 m; fama somer-restadejo, ludkazino, belega banejo, hotelaro, ekskursetoj), tagmanĝo en Südbahnhotelo. Reveturado kaj vespermanĝo en Wiener-Neustadt, antikva urbo dumvoje, aŭ en la fama kuracloko Baden ĉe Wien. Alveno en Wien 22 h (sv. fr. 17.—).

„L" Veturado per trajno de Wien al Puchberg ĉe la bazo de **Schneeberg** (2000 m). Ne pli ol 250 personoj povas partopreni. De Puchberg per dentrada fervojo ĝis Hochschneeberg. Diservo en Elisabethkapelo, tagmanĝo en la hotelo sur la supro. Belega panoramo, ekskursetoj al montkabanoj ktp. Reveturo per dentrada fervojo al Puchberg, kie estos vespermanĝo. (V) Reveturo per fervojo al Wien. Alveno 22 h (sv. fr. 11.25).
„M" Per aŭtobusoj al urbo **Mödling,** oficiala akcepto, Beethoven-memorajoj; plue al **Heiligenkreuz,** ege interesa monahejo, 800-jara, vizito; daŭrigo als fama kuracloko **Baden,** oficiala akcepto, rigardo de Romana fonto, unike bela parko, sulfur-banejoj, tagmanĝo, koncerto, ekskurso al Helenental aŭ ludkazino (aparte pagota!) aŭ grandioza bordbanejo. V. Reveturo al Wien, alveno 22 h (sv. fr. 7.75).
„N" **Per** fervojo al abatejo **Melk** ĉe Danubo, sur alta roko reganta la valon Wachau (Vahaŭ) Rigardo de la abatejo; T; reveturo per ŝipo sur Danubo tra Wachau, alveno en Wien 20 h. V. — Belega veturado preter ruinoj, kasteloj, urboj, ĉarmaj lokoj, certe same bela kiel Rejn-ekskurso (sv. fr. 8.50).
„O" Veturado per aŭtobusoj al **Eisenstadt,** ĉef-urbo de la Aŭstria Ligolando Burgenland, kun la tombejo de fama komponisto Josef Haydn, plue al impona antikva kastelo **Forchtenstein.** T. Reveturo tra urbo **Wiener-Neustadt,** vizito, V. Reveturo al Wien, alveno 22 h (sv. fr. 9.—).

Vendrede, 14. de aŭg.:

9 h 2. **Laborkunsido** en Hofburg.
T 12 h tagmanĝo.
T 14 h **Ekskurso I,** rondveturado tra Wien per aŭtobuso por tiuj, kiuj ne ankoraŭ veturis merkrede (sv. fr. 2.10).
14 h vizito aŭ al la ĉambraro en Hofburg aŭ al la imperiestra trezorejo por tiuj, kiuj ne jam marde ĉeestis unu aŭ alian.
15 h 30 **Ĝenerala kunsido de Aŭstria E.-Asocio.**
15 h 30 fakkunsidoj de
Int. Scienca Asocio Esp., adr. Marcel D. Dupuis, 56 Rue de la Rochefoucauld, Paris IX.
Tutmonda Asocio de geinstruistaj esp., 2. kunsido.
Unuiĝo de Esperantistaj virinoj, adr. Frieda Feichtinger, Wien, 13. Sankt-Veit-Gasse 76.
18 h 30 vespermanĝo.
20 h 30 **Kostumbalo sub la devizo „La Kongreso dancas" en ĉiuj festsalonegoj de Imperiestra Kastelo.** En la marmorsalonego ludos militista orkestro de Deutschmeister en siaj antaŭmilitaj uniformoj al dancado de valsoj kaj kontraŭdancoj; en Granda Festsalonego dua orkestro modernan dancmuzikon kaj en aparta salonego „Viena popolkantista kvarteto" ludos kaj kantistoj kantos al la muziko gajajn Vienajn kantojn por la nedancemaj samideanoj kaj por la jam lacaj.

Sabate, 15. de aŭg.:

9 h 30 **Solena Fermo de la Kongreso** en Hofburg.
T 12 h tagmanĝo kaj 13 h 30 Forveturo al Graz (Turisma Servo „Tra Aŭstrio").

Ni rekomendas baldaŭan aliĝon al la kongreso kaj speciale al la ekskursoj de Turisma Servo, por certigi al vi lokojn. Ni ripetas, ke estas vere malfacile ricevi eĉ nun



Placo de Sa. Stefano antaŭ 100 jaroj.

noktigejojn en Salzburg, ĉar en la nuna jaro oni jam antaŭmendis por ŝ 75.000 biletojn por la festludoj (lastjare en la sama tempo nur 17.000). Ni jam prizorgis por preskaŭ 200 personoj litojn en Salzburg, el kiuj 120 estas ĝis nun menditaj. La aliaj devos loĝi en privataj domoj aŭ en lokoj proksime de Salzburg, tien veturigotaj per aŭtobuso. Ĉiuokaze ni jam nun petas, ke vi pripensu la por ni tre malfacilan situacion speciale en Salzburg.

Por Wien vi ne bezonas nepre partopreni en la aranĝoj de Turisma Servo, kvankam partopreno estas ege rekomendinda, ŝparante al vi tempon kaj zorgojn. Sed ni ankaŭ prizorgos noktigejojn de plej malmultekostaj ĝis luksaj, se vi ĝuste ensendos la mendon kaj monon.

Ankaŭ manĝi vi povos pli simple ol ni deziras aranĝi por la Turisma Servo.

Donacoj al la kongreskaso:

Sumo laŭ n-ro 2	ŝ	186.65
Mauprime, Houillis	ŝ	8.75
Ravestein Jozef, s'Gravenhage	ŝ	8.75
Spyns Germaine, Dunkerque	ŝ	6.10
	ŝ	**210.25**

Donacoj al la blindulkaso:

Sumo laŭ n-ro 2	ŝ	60.75
Mauprime, Houillis	ŝ	8.75
Jacob Marie Jos., Thouon les Bains	ŝ	38.45
Hérion J., Verviers	ŝ	3.70
Hamann, Wauwatosa	ŝ	2.—
Spyns Germ., Dunkerque	ŝ	3.50
	ŝ	**117.15**

4. listo:

513. Gladka Janina, Kraków.
514. Kelder W. N., ofic., Den Burg, Nederl.
515. Tiessen Thijs, libroten, Den Burg.
516. Spyns Germaine, lernejestrino, Dunkerque.
517. Ghienne Jean, studento, Dunkerque.
518. Houlgatte, s-ro, komerc., Saint-Maur.
519. Houlgatte, s-ino, Saint-Maur.
520. Deblock Simone, instr-ino, Dunkerque.
521. Campagne Alice, instr-ino, Lille.
522. Agatouge, f-ino, intsr-ino, Bourbourg-Campagne, Franc.
523. Cardon Renée, sekr-ino, Saint Pol s. Mer.
524. Hoguet Yvonne, instr-ino, Coudekerque-Branche, Franc.
525. Ivanov, d-ro Georgi pop, veterinaro, Rahovo, Bulg.
526. Woodruff Edw. William, optik-instr., London.
527. Hamann Anna F., s-ino, instr., Wauwatosa, USA.
528. Finkelkraut Estera, instr., Warszawa.
529. Kellner Heinr., dir. de ĉeflern., Wien.
530. Fuchs Luise, instr., Aigen, Aŭ.
531. Toomingas Adele, instr-ino, Tallinn.
532. Kronk Marta, ofic-ino, Viljandi, Est.
533. Multrus Albine, Wien.
534. Isbrücker J. R. G., inĝ., vicprez. de UEA, Den Haag.



Graben antaŭ 100 jaroj; pestkolono en la mezo.

535. Isbrücker, f-ino, Den Haag.
536. Poell L. J. J. M., katol. parofiestro, Gemert, Nederl.
537. Simonis Th. M. A., instr., Rotterdam.
538. Peschke Klara, s-ino, Kopřivnice, ČSR.
539. Weis Herbert, Berlin-Tegel.
540. Fuchs Zenzi, instr., Putzleinsdorf, Aŭ.
541. Fuchs Hedwig, Putzleinsdorf.
542. Fuchs Josef, tajloro, Kalksburg, Aŭ.
543. Wüster Julie, Wien.
544. Grete Mayrhofer, Klosterneuburg.
545. Brazila Ligo Esperantista, Rio de Janeiro.
546. Societo de Geografio, Rio de Janeiro.

Karavanoj.

Ni tre dankas pro la vigla propagando de la karavanestroj. Ni jam menciis, ke BEA. (Goldsmith), SFPE. (Petit), SEF. (Malmgren), LEEN. (Baas), ESE. (Dresen) multe klopodis kaj kelkaj eĉ grandamase dissendis apartajn invitilojn presitajn. Nun ankaŭ s-ro Jakob Telling, Bellevoystr. 36, Rotterdam-C (poŝtĉekkonto 116.863), kune kun la prez. de „Nederlanda Katoliko", s-ro H. Damen, Brugstr. 10, 's-Hertogenbosch grandstile propagandas por karavano al la kongreso kaj Pollanda Esperanto-Delegitaro pere de sekr. s-ro Ludwig Kutscher, Kraków, Grodzka 9, komencis ĝin.

Ili ĉiuj estu dankataj nome de LKK.

Varbu inter neesperantistoj, por ke ankaŭ ili partoprenu nian 28-an kaj per tio fariĝu esperantistoj.

Al ĉiuj demandoj aldonu respondkuponon! Mendu niajn belajn glumarkojn: 50 po 1 resp. kup.

Al la alvoko por donaco Kreuz

kongresn-ro 3, paĝo 2:

1. listo.

Prof. Christaller, Stuttgart . . . . . ŝ 20.38

UNUIGO DE ESPERANTISTAJ VIRINOJ (U. D. E. V.)

La sentoj de malamo kaj malpaco regas la mondon kaj minacas al ĝi pereon. Ni ne povas plu silenti. Ni alten levu nian voĉon de protesto, por ke oni aŭdu en ĉiuj anguloj de la mondo, ke neniam la virina koro aprobos la terurajojn de milito kaj sangoverŝado!

Ne bela uniformo kaj tintanta sabro estas niaj idealoj, sed PACO kaj AMO!

Al la detruaj sentoj, kiuj venenas hodiaŭ la homaron, ni kontraŭmetu la solidaran fronton de niaj virinaj koroj. Dum la viroj forĝas armilojn, ni premu al ni reciproke la manojn trans la limoj!

UNUIGO DE ESPERANTISTAJ VIRINOJ

invitas ĉiun virinon kaj pac-amikinon veni al la 28a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en WIEN la 8—15 de augusto 1936 kaj partopreni:

specialan kunvenon de UDEV, okazontan la 14. en lernejo kaj grandan virinan manifestacion, okazontan la 12. en Festsalonego de Hofburg.

Represo malpermesita. Ĉiuj rajtoj rezervitaj. Copyright by „Internacia Esperanto-Muzeo", Wien.

Dr-o L. L. Zamenhof pri neologismoj.

La problemo de lingva evoluo sur la vojo de neologismoj estas konstante unu el la plej aktualaj en Esperanto; ĝi apartenas al la temoj plej diskutataj kaj disputataj en nia gazetaro. Sur unu flanko la „ortodoksuloj", senpardone rifuzantaj ĉiun neoficialan aŭ ne-Zamenhofan vorton aŭ terminon, sur la alia ekstremo la partianoj de kiel eble plej rapida kaj „libera" enkondukado de tutaj amasoj da neologismoj, ĉu por anstataŭigi per ili tro longajn vort-kunmetaĵojn, ĉu pro kaŭzoj psikologiaj (eliminado de „mal"-vortoj) ĉu, fine el la vidpunkto de internacieco. Kiun opinion pri tiu gravega problemo havis nia Majstro? La respondon ni trovas en ĉi-suba, a n k o r a ŭ n e n i e p u b l i k i g i t a l e t e r o d e d r - o Z a m e n h o f p r i n e o l o g i s m o j, direktita en la jaro 1906 al la prezidanto de la Lingva Komitato kun la peto, dissendigi tiun ĉi leteron — se li nenion havas kontraŭ ĝi — al ĉiuj membroj de la Komitato kaj peti ilin, ke ĉiu sendu al la Komitato sian voĉon pri la tuŝita demando. Ĉu tiu dissendo okazis efektive, ne estas al ni konate. La letero, naskita en la tempo de la tiam tre danĝera Ido-skismo, estas grava h i s t o r i a d o k u m e n t o, prezentanta al ni la aŭtoritatan opinion de la kreinto de Esperanto en klara kaj instruodona maniero. Dr-o Emil Pfeffer.

Ĉu Esperanto devas esti reformata aŭ ne? Tiu ĉi eksterordinare grava demando jam longe okupas la kapojn de multaj esperantistoj. Malgraŭ la ŝajna trankvileco, kiu ekregis en la mondo esperantista post la komuna voĉdonado en la jaro 1894, malgraŭ la konstanta publika ripetado de ĉiuj plej gravaj esperantistoj pri la netuŝebleco de Esperanto, malgraŭ la Deklaracio de Bulonjo, malgraŭ la interkonsento de ĉiuj redaktoroj de nia gazetaro, — la demando pri reformoj ne ĉesas okupi la kapojn de tre multaj esperantistoj. Ekzistas multaj personoj, kiuj ĝ e n e r a l e estas kontraŭ ĉia ŝanĝado, tamen pri tiu aŭ alia punkto a p a r t a, kiu ne plaĉas al i l i, ili pensas, ke por t i u ĉ i punkto oni devas fari escepton kaj t i u ĉ i punkto nepre devas esti ŝanĝita. Malgraŭ la ŝajna trankvileco p u b l i k a, mi tamen p r i v a t e ricevas ĉiutage diversajn leterojn pri ŝanĝoj, kaj kelkaj el la proponantoj estas eĉ tiel senpaciencaj, ke ili, forgesante la tutan danĝerecon de ilia paŝo, volis jam mem enkonduki reformojn kaj batali por ili.

Ĉu Esperanto devas esti reformata? Unuj respondas tiun ĉi demandon „jes", forgesante, ke tio ĉi enkondukus mirigan haoson en nian aferon kaj ke, por bone progresi, nia afero bezonas antaŭ ĉio severan konstantecon kaj unuecon; aliaj respondas per absoluta „ne", forgesante, ke porĉiama rigidiĝo estus neprudenta.

Ambaŭ diritaj partioj estas pravaj kaj ambaŭ ankaŭ estas nepravaj; ĉar ia a b s o l u t a respondo por la supre dirita demando en nia afero ne povas kaj ne devas ekzisti. Ni devas trovi vojon m e z a n, kiu de unuflanko gardus nin kontraŭ ĉiuj danĝeroj de „rompado" kaj de la dua flanko donus al ni la eblon forigi el nia lingvo tiujn kelkajn maloportunajn punktojn, kiuj en la tempo de la kreado de la lingvo ne estis rimarkitaj, malgraŭ la plej zorga kaj plej longa elprovado kaj kiujn elmontris nur poste la vasta, multjara kaj multepersona praktika uzado.

Ĉu ekzistas tia meza vojo, kiu de unu flanko gardus nin kontraŭ ĉia rompado de la unueco de nia lingvo kaj de la alia flanko donus al ni la eblon perfektigi ĝin? Jes, tia vojo ekzistas. Per kelkaj vortoj mi jam parolis pri ĝi en la antaŭparolo al la „Fundamento de Esperanto"; nun mi volas klarigi mian ideon pli detale. Mi intencis tion ĉi fari en la Bulonja Kongreso, sed bedaŭrinde mi devis tion ĉi prokrasti.

Antaŭ ĉio ni devas unu fojon por ĉiam fiksi konstantan kaj por ĉiam severe netuŝeblan f u n d a m e n t o n por nia lingvo (la legantoj scias, ke tiun fundamenton la esperantistoj jam fiksis per la „Deklaracio" akceptita en la Bulonja Kongreso). Damne al la decido, ke la esperantistoj ne faros en la plej malgrandan ŝanĝon en la fundamento de Esperanto, ni povas nun esti tute certaj, ke nia lingvo neniam disfalos kaj ke ĝis nun farita kaj akirita neniam perdos sian valoron.

Sed farante nenian ŝanĝon kaj nenian e l ĵ e t o n el la ĝisnuna lingvo, ni havas tamen la rajton a l d o n i al ĝi diversajn novajn vortojn aŭ formojn, ne sole por la ideoj, kiuj m a n k i s en niaj vortaroj, sed tiuj ĉi novaj vortoj kaj formoj savos la tutan situacion kaj donos al ni la eblon intime konsentigi la praktikan p e r f e k t i g o de nia lingvo kun ĝia plej severa n e t u ŝ e b l e c o.

Se ni bone kaj mature esploros niajn tutan lingvon kaj ĉiujn reformajn proponojn, faritajn en la daŭro de la pasintaj 19 jaroj, ni facile rimarkos, ke ĉiujn tiujn nun faritajn reformajn proponojn oni povas dividi en la sekvantajn kvin kategoriojn:

a) La unua (plej granda) kategorio prezentas reformojn, kiuj estas nur personaj kapricoj de tute nespertaj personoj kaj neniel al siaj aŭtoroj ili ŝajnas plibonigoj, sed al la plimulto de ĉiuj aliaj esperantistoj kaj ĉiuj personoj mature esplorintaj la aferon ili aperas nur kiel m a l p l i b o n i g o j de la lingvo. Tiun ĉi kategorion da reformoj ni sekve simple devas absolute forĵeti.

b) La dua kategorio prezentas reformojn, kiuj per si mem eble estus bonaj, sed kiuj tuŝas ne speciale la lingvon Esperanto, sed diversajn demandojn ĝ e n e r a l a j n, pri kiuj oni eble iam p o s t e povos komencu propagandon tute a p a r t a n, sed kiuj miksi kun la afero E s p e r a n t a ni absolute ne devas. Enkonduko de lingvo internacia estas jam per si mem afero tro granda, grava kaj malfacila, kaj se ni volas ĝin ankoraŭ pli malfaciligi per almikso de diversaj aliaj demandoj, tiam ni neniam atingos. Al tiu ĉi kategorio da reformoj apartenas ekzemple skribado stenografia anstataŭ litera, ŝanĝo de la formo de la literoj, aŭ almenaŭ forigo de la streketoj kaj punktoj. kiuj maloportunigas la skribadon (ekzemple en „t", „i" k. t. p.), forigo de la grandaj vortkomencaj literoj, filozofia pro cizigo de la senco de ĉiuj vortoj k. t. p. Al tiu ĉi kategorio apartenas ankaŭ la postulo doni anstataŭ la literoj supersignitaj iajn literojn novajn, aliformajn, kiuj liberigus de la maloportuna uzado de signetoj kaj de superflua skribado de „h". Tiun ĉi kategorion da reformoj ni en la nuna tempo devas kompreneble lasi tute sen atento.

Daŭrigo sekvas.

Radio Wien:

Ĉiun merkredon de 18 h 30—19 h **E.-kurso,** la fino „Informoj pri **XXVIII-a**".

Vendrede, la 17. de **aprilo** parolos dir. de stern. Verkehrsbüro **d-ro Willhelm** en sp. pri „Vieno, la kongresurbo" je 22 h 40.

Vendrede, la 24. de **aprilo** parolos prof. en mika Alternejo iaĝ. **Ernst Felix Petritsch** Esp. pri „La elektra ondo" je 22 h 40.

Radio en ČSR:

de 18 h—18 h 15 de Mor. Ostrava la 7., 21. kaj 28. aprilo **kaj 5. majo**; je h 15—22 h 30 de Brno, Praha I kaj Mor. trava la 29. aprilo. La 6. majo el la samaj coj 22 h 15—23 h 30 „Esperanta horeto" Radioludo de Mila Kolař „Reĝo de metoj".

Jubileos

prez. de Zamenhofa Esp.-Societo en lystok kaj ĉefdelegito de UEA por Polujo kobo Šapiro la 18-an aprilo pro 25-jara laca laboro por disvastigo de Esperanto. re gratulas al la jubileanto.

LKK de 28-a, IEMW, AEA, AE: Steiner.

Raporto

i la ĝeneral-kunveno de la membroj de ternacia Esperanto-Muzeo en Wien

Sabate, la 28-an de Marto 1936 okazis la eral-kunveno de la membroj de l'Internacia eranto-Muzeo en Wien en la ejo de l' nomita tuto. El la raporto de s-o kort. kons. Hugo ner estas notinda la mencio, ke IEMW, depost 1928 estas parto de la (ŝtata) Nacia bloteko, ricevas de ĝi senpage sole la ejon, adon kaj lumigon; cetere nenion. Por tele- kompensoj al la laborantoj, presaĵoj kaj elspezoj IEMW devas zorgi mem. La ron por tiuj lastaj elspezoj IEMW trovas parte el oficialaj subvencioj, en pli mal- ada parto el la kotizoj de siaj „dumvivaj broj".

Sekvis prelego de la raporto de la vizoroj. ĝi evidentiĝis, ke la elspez-kompensoj, kon- taj al prez. Steiner, estis al tiu elpagitaj parte kaj ĝis Majo 1933; de tiu tempo li nur por sia laborado kaj elspezoj ricevis ian rekompencon, sed ankoraŭ en la jaro el propra mono antaŭpagis ŝ 232 kiel ez-kompenson al la laborantoj, por certigi normalan funkciadon de la Muzeo.

La revizora raporto substrekis, ke ĉefe la o de ŝ 1.019.99, akirita ĉe la aranĝo de rn. Konferenco „Esp-o en la lernejojn kaj ktikon" Wien 1934, helpis al la subteno de MW dum preskaŭ du jaroj. (La nomita so rezultis el la finkalkulo de la budĝeto de rita konferenco kaj portas la vizon: „Ekza- nite kaj komparite kun la kasdokumentoj zentitaj, kaj deponitaj post kontrolo, ĉe la tra Oficejo de UEA. Robert Kreuz, membro la Prepara Kom., direktoro de UEA, ève, 25. Junio 1934").

Ĉe nov-elektoj unuvoĉe estis elektitaj en la traron: Prez. kort. kons. Steiner, vicprez. g. kons. Stengel, kasisto Gustav Weber, retario Ernst Werner, estraranoj: Dr-o Emil ffer, Lothar Steiner, Maria Weber, Louise wutschka.

Laŭ propono de Dr-o Pfeffer la raporto de la izora komitato pri la kasa spezado estis obita kaj al la ĝisnuna estraro, speciale al prezidanto kaj kasisto, estis donita la sarĝigo. Oni decidis esprimi la dankon al prezidanto, kort. kons. Steiner por lia ĝis- na oferema laboro en intereso de la Inter- cia Esperanto-Muzeo.

La funkciado de la Muzeo estas ĝis la a Univ. Kongreso de Esperanto absolute rtigita; la sekvanta kunsido okazos tial — se venos urĝaj demandoj — senpere post la ngreso. Tiam estos ankaŭ la ĝusta tempo, finitive decidi taŭgajn aranĝojn por daŭra, ekonomie sekurigita funkciado de tiu ĉi unika Esperanta instituto.

Loka Kuratora Komitato de IEMW.

Prusa Akademio de la Sciencoj kaj Esperanto. La Prusa Akademio de la Sciencoj en Berlin en sia kunsido de la 18a de marto 1936 rekonis al la pensiita fervoj-konduktoro Klemens Wieczorek en Reichenbach sciencan disertacion en **Esperanto** kaj transprenis la gardadon de la aŭtorrajtoj por ties publikigo. La esperanta verko estas titolita: „Sklavo" kaj pritraktas la vorton esencsimilan aĵ Dio kaj ĝian vivon en supernatura revelacio. La publikigo de la verko okazos post la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto en Wien.

Esperanto-Schlüssel (Germana E-ŝlosilo). Eldonejo de „Albrecht Dürer-Verlag", Wien, VII., Bandgasse 28 (Esperanto-Fako). Prezo: 5 ekz. por 1 intern. respond-kupono afrankite.

Esperanto-ŝlosiloj estas elprovite la plej valora kaj efika propagandilo, uzata ĉiam kun plej bona sukceso por varbado de interesuloj. La nova eldono de la germana ŝlosilo, sub aŭspicioj de UEA, estas plej zorge revizita kun modernigita enhavo, presita sur speciale facilpeza senligna papero; la prezo—por ebligi la plej vastan propagandon — **ekstreme malalta.** La pruvo de ĝia kvalito estas ĝia rapidega disvastiĝado: meze de marto aperis 5000 ŝlosiloj kaj ĉimomente restis da ili apenaŭ 500, tiel ke nova eldono jam estas preparata. Sole la „Esperanta Ligo en la Ceĥoslovaka Respubliko" (Praha, Uralské n. 447) jam mendis 2000 ekzemplerojn!

El Tutmondo

La Esperanto-Domo en Arnhem, ideala renkontejo kaj libertempejo de ĉiulandaj geesp.-istoj, kore invitas al jenaj someraj kursoj: 1. Kurso pri la „Esperanta literaturo", 25. Jul. ĝis 1. Aŭg. (gvid. S. Pragano; kotizo 4 guldenoj); 2. Internacia perfektiga kurso, 3. ĝis 8. Aŭg. (gvid. Andreo Cseh laŭ speciala sistemo kaj kun aplikado de helpiloj, disponigitaj al la kursanoj; kotizo 6 guld.); 3. Seminario por Cseh-metodaj instruistoj, 10.—15. Aŭg. (kotizo: 6 guld.); komuna kotizo por 2. kaj 3.: nur 10 guld.). **Adreso:** Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, den Haag, Nederlando.

Mendu senpage:

E.-Eldonaĵoj de Ministerio de Fervojoj en Praha, nome „**La Montaro Krkonoše** (Riesengebirge)", 1. eld., kun bela landkarto, fervoja karto kaj multaj bildoj sur 32 pĝ.; „**Altaj Tatroj**", 10. eld., kun land- kaj fervojkartoj, multaj bildoj sur 32 pĝ.; ambaŭ kun multkoloraj kovriloj. E.-eldonaĵo de Esp.-Asocio, Praha „**Praha**, ĉefurbo de Ĉeĥoslovaka Respubliko", 2. eld., 12 pĝ., kun belaj bildoj. Senpage de Esperanto-Asocio, Praha 47, ČSR. „**Slovaka ŝlosilo**" laŭ normo de UEA, prezo 1 int. resp. kup. ĉe la sama adreso.

„**Radio-Club d'Italia**" akceptis jenan rezolucion: „La konferenco, en kiu partoprenis ankaŭ reprezentantoj de kelkaj radio-elektraj asocioj, konstatas, ke la universala disvastiĝo de la senfadena telefonio postulas rimedon, por superi la lingvajn barojn kaj ĝi rekomendas tial la utiligon de Esperanto por informoj destinitaj al eksterlanda aŭskultantaro."

Internacia S. O. S. Bulteno.

Esperanto faras gravajn paŝojn sur la radiokampo kaj ĉiutage okazas pluraj elsendoj per aŭ por Esperanto.

Sed ĝis nun ne estis grava gazeto esp.-a radiista. Anoncojn pri okazontaj E-prelegoj oni faris en la gazetoj esp-aj kaj aliaj.

De ĉi-tiu monato Radio-klubo Esperantista de Francujo eldonas belan gazeton, kiu aperos ĉiumonate aŭ ĉiu-dusemajne, laŭ la enirontaj abonoj. — Oni skribu, sendu monon kaj petu senpagan specimenon de s-ro Alglave Michel,



Duko de Reichstadt (L'Aiglon); mortomasko.

150, rue Cronte-Voye, a Blanc-Misseron, Nord-Francujo. (jarabono: Francujo kaj landoj aliĝintaj al Interkonsento de Stockholm: 9 fr. fr.; aliaj landoj 12 fr. fr.)

Interŝanĝo de Junuloj. Studento Johano Geryk en Novy Jičin (Neutitschein) en Moravio, ČSR., invitas 15—18-jaran bonan kaj prudentan knabon el bona familio, kiu ankaŭ ludas pianon, al sia hejmo, por resti 4 semajnojn tie kaj viziti la belan ĉirkaŭaĵon ktp., **tute senpage.** Reciproke li deziras poste okaze de nia kongreso resti 4 semajnojn en Wien ĉe sia antaŭa gasto **ankaŭ tute senpage.** La foto de la junulo estas videbla en la Kongres-Oficejo en Wien.

Nederlandaj gejunuloj deziras korespondi kun gejunularo de aliaj landoj. Ĉiuj gejunuloj, kiuj deziras korespondi, povas skribi al la adreso de s-ro V. L. Vanveddingen, redaktoro de „De Nieuwe Eeuw", Helmond, Nederlando. La adresoj estos publikigataj en la nederlandaj gazetoj „Onze Courant" kaj „De Jonge Wacht".

Aŭstrio. Innsbruck (Tirol), --Goldenes Dachl" kaj **Kufstein (Tirol), strateto.** Jen 2 vere belege reproduktitaj ilustritaj poŝtkartoj en kupropreso. Sub la bildo troviĝas detala, proksimume 10-linia priskribo en Esperanto, sur la adresflanko esp-a steleto kaj la surskribo „Esperanto". — Eldonejo: Kunstanstalt Voremberg, Berlin, SW. 68, Lindenstraße 3.

XXV. Belga Kongreso de Esperanto. (La Louvière 30. majo—1. junio) eldonigis belajn reliefajn glumarkojn; 100 ekzempleroj estos sendataj post pago de 5 frankoj al la Poŝtĉekkonto Nr. III, 910.-XXVa Belga Kongreso de Esperanto — La Louvière. — LKK. estas certa, ke multaj samideanoj havigos al si tiun efikan propagandilon kaj, mendante multon, helpos ĝin kaj nian karan aferon.

Bulgarujo. „Varnenski Novini", Bulgara ĵurnalo aperanta en Varna, publikigis la 5an de marto sub la titolo „Antaŭen por Bulgarujo" sur tri kolumnoj la raporton de Hugo Steiner pri lia vojaĝo tra Bulgarujo kaj liaj intervenoj ĉe la Bulgara registaro por la 28a Kongreso de Esp. Ni dankas al la samideanoj Georgi Hr. Dimov kaj Georgi Sapunĝiev pro ilia propagando.

Ceĥoslovakio. En la kadro de Tutmonda Kongreso de katolikaj Esperantistoj en Brno kaj kiel paralela entrepreno estas ĉi-tie preparata granda Ekspozicio de Esperanto, de la 1. Aŭg. ĝis 16. Aŭg. 1936. La ekspozicio ampleksos tutan etaĝon de Kultura Domo kaj estos sub protektorato de Brn'a urbestraro. — Por la ekspozicio estas petata alsendo de ĉiuspeca taŭga esp-a materialo: prospektoj, gvidfolioj, gvidlibroj, afiŝoj, gazetoj ktp. La materialon sendu afable al: J. Vondroušek, Brno, Ubotanicke zahrady 31, ČSR. — Ĉion ricevitan oni kvitancos.

Danlando. Dum la lastaj jaroj nia movado treege disvastiĝis en Danlando. La esp.-istaro estas relative granda, sed la „gravuloj" ankoraŭ ne multe atentas nin. Por servi al la progreso de Esp. kaj por doni al eksterlandanoj favoran okazon viziti Danlandon, kie oni momente povas pasigi agrablajn feriojn tre malmultekoste pro la malalta valoro de nia mono, gesinjoroj Stig B. Skole, „Kornmod", Silkeborg, aranĝos kursojn, en kiuj partoprenos homoj el multaj landoj.

Cambro de klasikulo Grillparzer en la urba muzeo.

De 3. majo ĝis 31. julio estos 3-monata kurso (nur 70 danaj kronoj); de la 10. ĝis 19. julio kaj de 22. ĝis 31. julio estos 10-tagaj kursoj (nur po 40 kronoj).

En la kursoj instruos eminentaj instruistoj. Krom danoj: prof. **Collinson**, Anglujo, prof. **d-ro. E. Privat**, Genéve, prof. **W. Rerendsohn**, Germanujo, s-ro **A. Weide**, **Germanujo**, sro **de Ward**, Nederlando, gesinjoroj **Stellan Engholm**, Svedujo, poeto **Thorberggur Thordarsons**, Islando.

Germanlando. Laŭ „Heroldo" Hess. la anstataŭanto de Adolf Hitler, jus publikigis ordonon, en kiu li malpermesis al ĉiuj membroj de la partio esti anoj de organizo por propagando de artefarita lingvo.

Hungarujo. Int. Foiro de Budapest, 8.—10. majo eldonis en Esp. reklampendigilon, 4-paĝan gvidilon kaj glumarkojn por varbadcelo.

Hungarujo. „Hungara Itala Banko" (Banca Ungaro-Italiana Societá Anonima) enkondukis la esperanto-korespondadon kaj servon. Bonvolu serĉi la interrilaton kun ĝi pri Viaj bankaferoj en Hungarujo (ĉefe por aĉeti vojaĝĉekojn, ebligantajn la plej favoran pengoaĉeton kaj sekve malmultekostan restadon en Hungarujo).

IX. Jugoslava Kongreso de Esperanto okazos en Ljubljana, Pentekoste 30. de majo ĝis 2. de junio. Programo unika: Tuttagaj aranĝoj, grandstilaj publikaj koncertoj, Esp-a akademio disaŭdigota de Radio Ljubljana; prediko kun Diservo en Esp-o. Solenan malfermon disaŭdigos Radio Ljubljana. Ekskurso al Kamnikaj kaj Juliaj Alpoj. Interesa kongres-aranĝo estos la prezentado de „Servisto Jernej kaj lia rajto", moderna dramo kun ĥoro kaj lumbildoj, kaj aŭtobusa ekskurso al la somera rezidejo de jugoslavaj reĝoj-Bled! Sur jugoslavaj fervojoj rabato de 50% ,eksterlandanoj verŝajne liberigotaj de vizopago. — Informoj: Esperanta klubo (kongreso), Ljubljana.

Nederlando. La Komitato por la teknika vortaro pri la lumigado decidis dum sia kunsido la 3an de marto unuanime akcepti en tiun vortaron ankaŭ Esperanton. La vortaro estas preskaŭ tute jam pretigita. Ĝi devas aperi presite ankoraŭ antaŭ la someraj ferioj.

Nederlando, gazetarservo. Ke la gazetarservo en Nederlando funkcias modele kiel imitinda ekzemplo por la aliaj landoj, tion pruvas precize la statistiko, montranta ĉe la fino de la jaro 1935 la rekordan kvanton de 2300 p r i e s p e r a n t a j p u b l i k a j o j e n 142 n e d e r l a n d a j g a z e t o j. La regula funkciado kaj serioza aktiveco de la servado estas bone rekompencitaj. Ĉiuj E-societoj de Nederlando havas parton en tiu sukceso, speciale „La Vojaĝanto Estas Nia" kaj la katolikaj samideanoj.

Portugala Esperantisto, monata organo de portugala esperantista movado novaperis. Direktoro: Manuel De Jesus Garcia, redaktas: Joaquim Costa. Redakcio: Rua do Jardim do Regedor, 5. 4-o. Lisboa, Port. Jarabono fr. frankoj 7.

Porhejmaj Taskoj

Patrino kaj infano.

La malgranda Edito rakontas al la patrino: „Mi desegnis belajn objektojn: Ĉirkaŭ la tablo kvar seĝojn, apud la forno unu benkon kaj unu benketon, apud la muro unu grandan kofron, super la lito unu belan bildon, unu horloĝon kun du montriloj kaj dekdu ciferoj, sur la fenestro multajn florojn en ĉiuj koloroj, sur la tablo la kudrilaron por la patrino kaj la gazeton por la patro."

„Vi desegnis diligente, mia kara bona infano."

„Sed nun mi desegnos la plej belan", la malgranda knabino diris kun ridantaj okuloj. „Kio estas tio?" la patrino demandis. „Tio vi estas, mia kara patrineto."

Nenio kaj tamen io.

Je la dudeksepa de la monato sinjorino Meier sidas ĉe la forno kaj rigardas konstante sur la plankon. Ŝia edzo rigardis ŝin kaj demandas fine: „Pri kio vi pensas?" — „Pri nenio." — „Tio de no estas ebla!" — „Do nome mi pensis pri la pormastruma mono, kiun mi ankoraŭ havas."

Luise Fuchs, Aigen, O.-Oe.

La plej preferata profesio.

Jam vivis reĝo, sed en lia lando nenio graca okazis kaj li enuis multe. La korteganoj vane penadis amuzi lin. Jen la kortega arlekeno havis ideon. Kiam ili sidis kun la reĝo en la ĉambrego, la arlekeno demandis subite: „Ĉu iu povas diri al mi, kia profesio estas la plej disvastigita en ĉi tiu urbo?"

La respondoj estis tre diversaj. Kiam ĉiuj diris sian opinion, la arlekeno ekparolis kaj diris. „Ĉio falsa, sinjoroj! La plej oftа profesio en nia urbo estas kuracista arto." Jen ĉiu ekridis, kaj ankaŭ la reĝo ridetis kaj diris: „Tio ne povas esti vera. Ĉiu infano scias, ke ni havas tre malmultajn kuracistojn." Fine la arlekeno vetis kun la reĝo, ke li pruvos sian aserton en la daŭro de dudekkvar horoj.

La sekvantan matenon la ellitiĝinta arlekeno ligis tukon ĉirkaŭ siajn kapon kaj kolon, kvazaŭ li havus grandajn dolorojn. Ĉe la foriro, lia edzino demandis lin, kion do li havas kaj konsilis al li rekuŝigi sin kaj bonorde ŝviti. Kiam li iris tra la dompordego, li renkontis la pordistinon, kiu konsilis al li ian rimedon.

Tiel li renkontis en la mallonga vojo al la reĝo ankoraŭ multajn konatojn kaj ĉiu konsilis al li alian medikamenton por kuraci la dolorojn. Tiel li alvenis fine al la reĝo. Kaj kiam la reĝo vidis la arlekenon tute envolvitan en tukoj, li ekparolis: „Sed kiel vi aspektas! Ĉu vi havas dolorojn? Sed tiam vi devus..." Sen finatendi, kion la reĝo volis rekomendi al li, la arlekeno deŝiris la tukon de la kapo kaj kolo kaj diris: „Sekve ankaŭ via moŝto estas kuracisto! Tie ĉi mi notis la nomojn de ĉiuj tiaj kuracistoj, kiujn mi renkontis en la mallonga vojo ĝis ĉi tie, kaj la rimedojn, kiujn ili rekomendis al mi. Preskaŭ la duono de la loĝantaro de nia urbo estas kuracistoj."

Jen la reĝo ridis kaj pagigis al la arlekeno la vetsumon. Bruno Koffler, Wien.

Spritaĵo.

Fraŭlino moderne kaj riĉe vestita, venis al la estro de malriĉa vilaĝo kaj diris: „Mi apartenas al via vilaĝo kaj bezonas ateston pri malriĉeco."

Parohestro Julius Amann, Fraxen, Vorarlberg.

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefdelegiteco por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

Por la kolekto „**Vidvino Kreuz**" nia deleg. Zeller en Steyr donacis S 5.— kaj kolektis en la grupo S 14.—. Mi transdonis la monon al Aŭstria E.-Asocio kaj kore dankas. Aliaj delegitoj imitu tion! Weber.

Biciklantoj!

Ni faru komunajn ekskursojn, propagante por Esp. Skribu al: Max Rudolf Frey, Wien, VIII., Alserstraße 63 a.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

Je memoro al Robert Kreuz por lia vidvino
2. listo.

El la 1. listo	ŝ 10
d-ro inĝ. Eugen Wüster, Wieselburg	ŝ 2
Alex. Schwarz, Wieselburg	ŝ
Leopold Kail, Wien	ŝ
Herbert Kail, Wien	ŝ
ges. Kaiper, Gloggnitz	ŝ
generalŝtabkur. d-ro Dietl, Baden	ŝ
Gretl Mayrhofer, Klosterneuburg	ŝ
kortega kons. d-ro W. Heebr, Wien	ŝ
Valerie Winkelhofer, Wien	ŝ
lernejdir. E. Dittrich, Wien	ŝ
Supra Aŭstria E.-Soc. neŭtrala, Linz	ŝ 1
Esperanto-Klubo, Wien	ŝ 2
E.-gruppo Klagenfurt	ŝ 10
Kolekto Zeller, Steyr	ŝ 1
sumo	ŝ 12

por kiuj ni kore dankas. Ni esperas, ankoraŭ multaj sendos almenaŭ sumetojn ĉi tiu bona afero. Kore AEA

Al la neŭtrala esperantistaro de Aŭstrio.

Karaj samideanoj!

Apenaŭ kelkaj monatoj apartigas nin ankoraŭ de la plej grandioza Esperanta manifestacio en nia urbo kaj lando, de Universala Kongreso de Esperanto. La Loka Kongresa Komitato faras ĉion necesan, por ke tiu kongreso daŭre sin enskribu en la historion de nia movado kaj fariĝu potenca stimulilo por plua prosperado de l'Esperantismo en Aŭstrio.

Sed tamen, kvankam niaj fortoj ĉi-momente devas esti koncentritaj por digna preparo de nia Internacia Festo, niaj okuloj tamen dum ne devas sin deturni de la alia grava antaŭ kondiĉo por regula kaj sukcesa progresado de Esperanto en Aŭstrio: ni pensas pri **landa kaj internacia Esperanto-organizoj.**

Ĉar en la lasta tempo de pluraj flankoj estis farita la provo fondi alian landan organizon, estas konsilinde konsciigi al si la **gvidajn ideojn,** sur kiuj nia landa organizo devas esti bazata. Tiuj ĉi ideoj estas:

1. Nia landa organizo devas esti ne**gisfunde neŭtrala.** Ĝi devas neniel malkaŝe nek kaŝe, havi ian alian celon krom ekskluzive disvastigadi per komunaj fortoj la Zamenhofan Esperanton. Ankaŭ la **enhavo** de tiu propagandata Esperanto-lingvo devas esti neniam kaj neniel politike agordita kaj la personoj de la gvidantaro kaj ilia pasinta agado por esperanta devas doni ĉian garantion pri absoluta libereco for de ĉiaj politikaj aŭ klasbatalaj tendencoj.

2. Ĉar la organizo de l'esperantistaro estas pensebla sole sur bazo **tutmonda,** tial ankaŭ por la landa organizo de l'aŭstria esperantistaro devas esti unu el la ĉefaj celoj, servi kiel ponto al la internacia Esperanto-movado, kaj estas organizi sian anaron ankaŭ internacie. La landaj organizoj estas kvazaŭ nur branĉoj kaj la internacia organizo — arbo; limigi sin sole al landa organizo kaj rezigni konscie pri la aliĝo al la internacia kunigo de la fortoj kaj penadoj, estus intenca kripligo de nia programo, bazita sur internacia kooperado.

La internacia organizo por la neŭtralaj esperantistoj estas donita sole en la Universala **Esperanto-Asocio en Genevo** (kies landa oficiala parto estas Aŭstria Esperanto-Asocio) — la aliaj internaciaj Esperanto-organizoj: ekz. Parizo (Sennacieca Asocio Tutmonda) kaj Moskvo, propagandas nur Esperanton, ne povi poste per ĝi propagandi siajn ideojn: tio kompreneble ne estas konsiderebla por esperantistoj de Aŭstrio. Sole la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kun la centro en Paris estas laŭ Esperanto-organiza vidpunkto agordita al Ĝenevo kaj ĝiaj membroj en Aŭstrio estas anoj de Aŭstria Esperanto-Asocio.

La atentan konsideron de ĉio supre dita kaj zorgan ekzamenon de ĉiuj novaperantaj organiz-projektoj sur la menciitaj prov-ŝtonoj 1. ĉu vere neŭtrala? 2. kiel internacia agoro

Genevo aŭ aliloken?) ni insiste rekomendas ĉiu neŭtrala aŭstria samideano. Neniu do sin forregali per ĝenerala respondo aŭ lisma elturniĝo je tiuj du fundamentaj de-ndoj! Kaj esplorinte detale la aferon, li jam os, kie estas lia loko!

Aŭstria Esperanto-Asocio, la sola landa anizo en Aŭstrio reprezentata en Genevo landa organizo por la sama lando ne as esti agnoskata de UEA), havos dum la Univ. Kongr. de Esperanto sian ĝeneral-venon, al kiu ĝi kore invitas ĉiujn aktivajn tralajn samideanojn de nia lando. Nur la eral-kunveno estas la lasta kaj plej kom-enta instanco por priparoli la bezonojn de landa E-movado kaj la programon por la kretaj laboroj de nia plej proksima eston-o. Kaj se de tiu aŭ alia flanko la agitado traŭ Aŭstria Esperanto-Asocio estus farata , ke oni volus ruze eluzi la kontraŭemon de aj personoj kontraŭ tiu aŭ alia persono el straro de AEA, tiam jam nun en la nomo l'nuna estraro de AEA estu deklarate, ke sonoj ne estas gravaj, kiam temas pri eco kaj konservo de l'absoluta neŭtraleco la kadroj de l'Aŭstria Esperanto-movado, do neniu el la gvidantaj personoj de AEA iras esti reelektata kaj ke nur unu estas esa, nome ke la aŭstria esperantistaro ĉe lektoj donu sian konfidon nur al tiuj, kiuj sia persono kaj ĝisnuna agado ŝajnas al la plej fidindaj por daŭrigi la verkon de menhof kaj ĝian puran ideologion, liberan iuj kromideoj, sur la fruktodona grundo, ta per la favoro de nia registaro, per la hoforto de la Mondkongreso kaj per la jara, sindona laborado de niaj aŭstriaj erantopioniroj.

Aŭstria Esperanto-Asocio.

Neniu aŭstriano restu ekster la vicoj de AEA/UEA.

Kotizo pojare: ŝ 2.—, por familianoj nur aj same por senlaboruloj. Ili per tio ĝos membroj de AEA, simplaj de UEA respondkuponoj) kaj ricevos membro-on kaj ĉiumonate apartan informilon liobligitan. Ĉion nur por tiu malalta sumeto, neniu postrestu!

Landaj delegitoj de AEA. Esperantaj grupoj la ĉefurboj de la federaciaj landoj en Aŭstrio ricevis la inviton de AEA komisii al unu petenta samideano la iniciaton, zorgon kaj rolon pri aranĝo de kursoj, prelegoj kaj propagandaj kaj organizaj entreprenoj en koncerna federacia lando interkonsente kun A, same kiel tion faris jam Tirolo, kies Innsck-a grupo elektis por tiu ofico sam. d-ron ner. Ni invitas la ceterajn federaciajn dojn, sekvi tiun ekzemplon, taŭgan bone celi la lokan movadon. Por la lando Wien, la ekzisto de multaj grupiĝoj ni rekomen-la starigon de ĉiumonate interkonsiliĝanta legitaro, laboranta tiamaniere, ke la grupoj intaj al AEA, delegus al ĝi po unu delegito. aliaj grupoj estas invitataj, partopreni en kunsidoj kaj kunlabori per siaj sugestoj kaj siloj. La starigo de landaj delegitoj en ĉiuj raciaj landoj de Aŭstrio, starantaj en kon-nta kontakto kun AEA, forte povas ntribui al intensivigo de la varba laboro. — nomitaj grupoj estas do petataj meti tiun ĉi van punkton sur la tagordon de siaj nun antaj kunvenoj kaj baldaŭ raporti la rezul-al AEA.

Esperantoklubo Innsbruck. La 27. de feb. azis en gastejo „Goldener Hirsch" la jara eralkunveno de E-klubo Innsbruck. Post itaj agadraportoj, el kiuj ĉefe la vigla kursa propaganda agado meritas esti substrekita, azis la nov-elektoj: prezidanto Rol. Kühcher, vicprez. Hans **Barek**, sekretario D-ro ton Karner. Kasistino f-ino Maria **Seewald**, bliotekisto Christian **Wulz**, estraranoj Martin ckl kaj Maria **Esterhammer**. Sam. F. W. enting el Batavia, la malegoista amiko kaj silanto de la klubo kaj senlaca organizanto E-movado en Tirolo, estis unuanime elektita **honora membro.** La kunveno estis evidente sub la signo de l'alproksimiĝanta Univ. Kongreso, kiu jam nun en tuta Aŭstrio vekis novan aktivecon.

Riedau. Poŝtadministranto Rudolf Ulbrich transiĝis de Petersbach al Riedau kaj gvidas en tiu de Esperanto ankoraŭ netuŝita loko kurson kun 18 personoj.

Esperanto-grupo Salzburg. La 4-an de marto okazis ĉi-jara ĝeneralkunveno kun nov-elekto de la estraro: Prez. D-ro Franz **Christanell**, profesoro; vicprez. Fritz **Stegmüller**, diplomkomercisto; kasisto Ferdinand **Noggler**; sekretario Fritz **Scheirl**, gimn. prof. e. p.; Bibliotekistino: f-ino Hilda **Kahr**; estraranoj Franz **Föttinger**, Karl **Gerhard**, Albert **Kern**, Hermann **Palfinger**, Max **Thiel**. Prof. Christanell komencis kurson por poŝt-oficistoj.

Esperanto-Klub, Wien. En la ĝeneralkunveno, okazinta la 31. de marto, prez. kort. kons. Steiner faris raporton pri la agado de la Klubo, el kiu oni sciiĝis, ke la Klubo aranĝis ĝis nun dum ĉiu jaro almenaŭ 4 grandstilajn aranĝojn, en kiuj ĉiam sufiĉe granda publiko ĉeestis. En la pasinta vintro en 3 tiaj aranĝoj ĉeestis proks. 900 personoj. La grupkunvenoj estas kontentige vizitataj, ĉiam inter 40 kaj 60 personoj ekzercas Esperanton kaj formas „familian rondon", en kiu ne estas spaco por organizaj debatoj aŭ aliaj. En ĉi tiu jaro la membraro kreskis ĝis 74 kaj dum la ĝeneralkunsido aliĝis krome 3*). La kasstato estas ŝ 198.40. Post dankvortoj al la estraro kaj al la revizoroj Neumann kaj Resch okazis novelektoj: prez. kort. kons. Hugo Steiner; vicprez. reg. kons. Fritz Stengel kaj d-ro Max Höfer; kas. Neumann Alex., Alice Falk; sekr. Elfriede Hojtasch, Grete Mayrhofer. En la komitaton por aranĝoj estis elektitaj: prez. Steiner kaj d-ro Höfer, f-inoj Hojtasch kaj Mayrhofer, s-roj Neumann, Schlerka kaj Stengel, s-ino Tischler-Pfister.

Decidoj: Aliĝi al 28-a (grandparto de la membroj persone jam aliĝis) kaj donaco al la kolekto Kreuz de ŝ 20.—.

La 19. de aprilo 1. ekskurso kamparen. Detalojn aparte! Por E.-Klubo, Wien, I., Neue Burg (kunvenoj ĉiumarde de 18h30 ĝis 22h en I., Wallnergasse 6, unua pordo dekstre en la domenirejo): Steiner, Hojtasch.

---

*) Ĉiuj kompreneble estas membroj de AEA/UEA.

3-a festvespero por la Radio-Esp.-kursanoj.

La 28. de marto ĝi okazis en la festsalonego de Magistrata Domo Wien, IV., aranĝita de Esperanto-Klubo kaj ties prezidanto kort. kons. Steiner, la Radio-instruisto en Radio-Wien. La vespero estis sub la devizo „Printempa ekvekiĝo".

Ĉiuj geaktoroj, plejparte Radio-lernantoj, senpage disponigis sin kaj igis la feston vere bela. Specialan dankon ni deziras esprimi al la ankaŭ en E.-rondoj bone konata koncert-kantistino Elsa Sgalitzer, kiu afable transprenis la aranĝon de l' festo, pro ŝia altranga kantarto. Bonegan ĝuon faris ankaŭ la aliaj, ĉiu en sia maniero: Lissy Siedek, la virtuoza violonludistino; Mathilde Gangl, per sia juneca figuro kaj bela voĉo reprezentante la printempon; Leopoldine Bieberle, sentimentplena kaj samtempe humora deklamartistino; Mary Lippert, bonege parolinte en granda melodramo. Specialan dankon al Margit Szekely, kiu elegante kaj vere ensenteme akompanis sur la fortepiano ĉiujn kantojn kaj la violonludon kaj ankaŭ la unuan fojon ludis jus eldonitan marŝon „Tra la mondo".

Operkantisto M. Puntschart entuziasmigis per sia grandioza baso kiel Hans Pegritsch per sia belega tenoro. La humorplena Gustl Schlerka kantis al la liuto kaj ravis ĉiam denove la aŭskultantojn. La sprita konferenciero multe kontribuis al la bonega sukceso de la festo.

La ĉeestantaro multege aplaŭdis la unuopajn erojn de la programo, kiu estis parte en



En loĝdomo de Schubert.

germana lingvo parte en Esperanto (tradukitaj de reg. kons. F. Stengel).

La fortepianon disponigis afable kaj senpage la fama fabriko Gustav Ignaz Stingl, Wien, IV., Wiedner Hauptstraße 18.

Ekskurso al Kreuzenstein.

19. de aprilo.

Ni invitas niajn klubanojn, la samideanojn kaj la Radio-kursanojn al partopreno! Plej bona vojo: tramo ĝis la haltejo ĉe la devojiĝo al Strebersdorf (ŝanĝo de la tramo en Floridsdorf-Spitz), de tie piede al Korneuburg. Kiuj ne ŝatas marŝi 1 horon, veturu de tie per aŭtobuso al Korneuburg (85 g). En Korneuburg renkontiĝo sur la ĉefplaco je la 10h kaj vizito de la urbdomo. Poste marŝado (¾ horojn) al Kreuzenstein (eventuale per aŭtobuso). Vizito de fama burgo. Manĝado de kunprenita nutraĵo! Amuzado, ludoj ktp. — Posttagmeze je reveturvojo trinkado de kafo malmultekosta. Reveturo sammaniere! Venu multnombre!

Esperanto-Klubo: Steiner.

Germana ŝlosilo po 1 je 15 g afr.; 5 p 50 g afr.; 11 p 1 ŝ; 57 p 5 ŝ; 115 p 10 ŝ aŭ senpere ĉe la eldonejo Dürer-Verlag aŭ en iu librovendejo aŭ ĉe ni, kiuj tuj aranĝos la alsendon. Mono en poŝtmarkoj aŭstriaj antaŭe sendota.

R. Lechner, librovendejo, Wien, I., Graben, ekspozas en siaj elmontraj fenestroj E.-literaturon.

Gratulon al ges-roj **Kokurewicz** okaze de la naskiĝo de malgranda Peter Gregor.

Revo kaj devo.

De Karl Vanselow-Berlin.

Vivo ne konsistas nur el revo.
Antaŭ ĉio staras devo, devo!

•

Esperanton ne nur frandi!
Danka tasko: propagandi!

•

Vino, virino kaj kanto,
Sed ne sen Esperanto!

Recenzoj

D-r. inĝ. E Wüster. **Mejdunarodnaja standartizacija jazyka w tehnike.** (Internacia normigo de la lingvo en la tekniko.) — Traduko el la germana kaj prilaboro de O. Bogomolov, redakto de E. K. Drezen, prof. L. I. Jirkov, inĝ. A. F. Lecofin kaj prof. M. F. Malikov. Stata Eldonejo por normigo „Standartgiz" 1935, Leningrad-Moskva. Presejo nom. Wolodarski, Fontanka, 57. Eldonkvanto 3000 ekz.

Jen rusa oficiala eldono de la fama verko de Wüster: Internationale Sprachnormung in der Technik. La amplekso de la verko estas iom malvastigita, la enhavo kunpremita kaj adaptita al la bezonoj kaj postuloj de la rusa lingvo; la tuto okupas 300 paĝojn da dense presita teksto. Al la libro estas aldonita resumo en la lingvoj franca kaj E. Giaj finkonkludoj estas jenaj: „Esperanto taŭgas por teknikaj celoj minimume same multe kiel la angla lingvo. Esp. kontentigas en alta grado



Hoher Markt; arteca ludhorloĝo de Asekursocieto „Der Anker".

la postulojn de lingva boneco. La internacia teknika lingvonormigo estas pli facile realigebla per la helpo de E., kiu estas pli ‚plastika' ol la naciaj lingvoj kaj ankoraŭ ne tiom finstampita. La normigitaj esperantaj esprimoj laŭ japana propono povus esti uzataj sammaniere kiel la latinaj nomoj de bestoj kaj plantoj.

Rekomendiĝas, enkonduki E.-on unue nur en unu sola branĉo de la tekniko, sed tie laŭ skalo internacia. Antaŭdestinita por tio estas la elektrotekniko." D-ro E. Pfeffer.

Kudlago. (La malgranda Eskimo.) Verkis N. van Hichtum, el la nederlanda tradukis S. D. Mannoury. Eldonis Förlagsföreningen Esperanto. Prezo sved. kr. 0.75. — 40 paĝoj da teksto.

La libreto prezentas en simpla kaj klara lingvo interesajn aventurojn el la vivo de malgranda eskima bubo. Kiel li la unuan fojon partoprenas fokoĉasadon, kiel li kun la patro faras novan sledon (glitveturilon), ursoĉason, la ĉasado je nordaj cervoj kaj tiel plu, jen la ĉefaj temoj de tiu libreto, kies aŭtoro estas konata verkisto por infanoj. La esp-a teksto povas bone taŭgi ankaŭ por komencantoj. — La kovrilo de la bel-aspekta libreto prezentas tutpaĝan originalan bildon de la malgranda Kudlago, kaptanta fiŝojn.

Korektoj kaj aldonoj al la poŝkatalogo de la Esperantaj porokazaj glumarkoj. Kompilis D-ro Jozefo Takács. Eldono de la aŭtoro. Prezo 40 hung. heleroj aŭ 1 int. respkupono. — Nagymaros 1936. — Hektrografita listo de internaciaj esp-aj glumarkoj, interesa por ĉiu kolektanto. Bedaŭrinde nur, ke la hektografaĵo estas farita tro primitive, tiel ke kelkloke kelkaj cifer-indikoj estas apenaŭ legeblaj.

Program for 8 Dages Kursus med Esperanto-undervisning paa Ry Folkehojskole. 31. Julio ĝis 7. Aŭg. 1936. 4 paĝa ilustrita programo en dana lingvo.

Dutchregional Conference of the New Education Fellowship, Utrecht,, Leeuwenbergh Building. Aprilo 14a—20a 1936. Riĉe ilustrita programo pri prelegoj en angla lingvo, inter ili tiu de Prof. J. Glück (Berlin) pri „Esperanto as an aid in learning to live together".

Libervola civila helpservo Internacia. 16 paĝa broŝuro, riĉe ilustrita, eld. de „Sekretariejo de Libervola Civila Helpservo Internacia", 6, Klaraweg, Bern ,Svislando. Antaŭparolo de Edmond Privat. Prof. W. Perrenoud kontrolis kaj korektis la manuskripton. Prezo 1 resp. kup. Mendoju al Julio Gilliard, rue des Granges, Neuveville, Svislando.

Bonguste presita, verkita en pura kaj klara esp-a stilo kaj traktanta pri etike kaj socie ekstreme grava movado, la libreto meritas grandan disvastiĝon; ĝi estu varme rekomendata!

Raporto de la **Aerologia Observatorio de Tateno, No. 10.** Eldonita de la Aerologia Observatorio en Tateno apud Tutiura (Ibarakiken), Japanujo, 1935. 280 paĝoj en folioformato. — Prezo ne montrita.

En tiu ĉi numero de la raporto, finita en decembro 1935, estas publikigataj la rezultatoj de la aerologiaj observadoj, faritaj en la Aerologia Observatorio de Tateno dum la tuta jaro 1932. La situacion kaj aranĝon de la observatorio priskribas detale la unua numero de tiu ĉi raporto. La eldonon de tiaj gravaj kaj ampleksaj sciencaj publikigoj en Esperanto ni devas danki al Prof. W. Oishi, la direktoro de l'nomita observatorio.

Ilustrita lernolibro de Esperanto por praktika komenca kurso. Metodo didakta de Delfi Dalmau, L. K. 28 paĝoj en granda formato, 10 instruaj bildtabeloj kaj 1 multkolora bildo. Prezo 1 angla ŝilingo. Ricevebla de la Aŭtoro, Apart. 5081—Barcelona.

La „rekta" metodo de Esperantoinstruado, instruado sen la pero de la gepatra lingvo, fariĝas en Esperantujo ĉiam pli populara, tion pruvas ree la eldono de tiu ĉi lernolibro, inspirita de la Ce-metodo. Jen la tezoj de l'aŭtoro: Ĉiuj vortaroj kaj gramatikoj de vivanta lingvo, estas verkitaj kaj studataj post aŭ sur la lingvo, kaj tute ne antaŭe! Esperanto estas hodiaŭ vivanta lingvo. Oni devas lerni kaj lernigi ĝin, unue, praktike, kiel la gepatroj lernigas la infanojn paroli, kiel la infanoj lernas paroli hejme. — Post la baza kaj vivanta parolata lingvo venu la gramatiko kaj la vortaro — kaj la gramatikisto kaj la vortaristo; sed unue la vivo kaj poste la filozofio.

D-ro A. Tellini, L. K., verkis „Gramatiche, Vocubulari ed Eserciçis di lenghe internaçionâl". 32 pĝ., prezo 2 Lirojn. — Lernlibro por Ladinoj de Friullando.

Ĉu mi dormas „libera" de san-detruaj terradioj? Verkis J. G. Mieremet, esperantigis el la nederlanda lingvo Marie E. Giltay, Parkweg 99, Voorburg, Nederlando. — Prezo ne montrita.

La broŝuro pritraktas tre interesan temon, nome la al la sanstato treege malutilan influon de certaj radioj, elradiataj el la tera grundo, kies ekziston kaj situacion oni povas konstati per divena vergo. — Nova kampo por ekkono kaj esploro, ankoraŭ tre pridisputata de la „oficiala" scienco; pluraj koloraj skemoj helpas kompreni la tezojn de l'aŭtoro.

La religiaj cirkonstancoj en Svedujo. Kaj ilia influo al popolmovadoj kaj kulturo. De Gunnar Furhammar. Eldonis Svenska Missionsförbudets förlag, Stockholm. 48 pĝ., riĉe ilustrata. Prezo 75 oeroj.

La Aŭtoro diras en la antaŭparolo, ke, ĉar Svedujo apartenas al la pli malgrandaj nacioj, ĝia lingvo tial ne estas komprenata de aliaj popoloj, ĝia spirita vivo kaj ĝia kulturo estas ĝenerale tre malmulte konataj en la eksterlando. Tial la libreto aperis en Esperanto, por ke ankaŭ eksterlandanoj ekkonu tion, kio karakterizas la spiritan vivon en Svedujo. La Aŭtoro transprenis kelkajn datojn kaj eltiraĵojn de aliaj verkistoj, i. a. Axel Andersson, Helmer Prozth kaj Josef Roth. Tio precipe koncernas la temon pri la vekiĝo kaj la klereco, kaj la ĉapitron pri la sendieca movado kaj aliaj malhelpoj al la kristanismo.

Stepan Mišak, Adana, Turkujo (Ciritli Mahallesi 110) aperigis sian 4-an volumeton „Tra Mistera Oriento" aŭ „Miaj Memoraĵoj", 38-paĝa malgrandformata. Aperas du-monate. Prezo unuope 2 resp. kup.; jarabono 10 resp. k.

Esperanta kantareto de G. O. Karlsson, dec. 1935; propra eldonejo Hassle, Stehag, Svedujo. 31 pĝ.. malgrandformataj; prezo 35 öre.

Enhavo: svedaj kantludoj, kantoj, fabloj, el kiuj „Nova printempkanto" kaj du fabloj estas originalaj.

„Tra la mondo", Esperanto-marŝo de Hans Nowotny, eldoniĝis en Phöbus-eldonejo Hans Poddany, Wien, VI., Gumpendorferstraße 117. Prezo ŝ 1.—.

Interesaj artikoloj pri „Viena kafejo" (Fr. Vasta) kaj „La olimpia tradicio de Aŭstrujo" (Dr. Halbedl) en venonta numero.

Rekomendataj:

Cigaroj kaj cigaredoj de
Oesterreichische Tabakregie
famaj kaj preferataj en la tuta mondo p
sia kvalito.

Nia oficiala kongresasekurejo „Der Anke
Wien, I., Hoher Markt 10—11, donas
al la kongresanoj, venontaj el iu Eŭro
Lando escepte Rusujo, por asekuro de pa
oj kaj kontraŭ akcidentoj en la daŭro
1 monato jenajn speciale favorajn kotizoj
I. sfr. 2.35 a) por pakaĵasekuro je ŝ 500.
b) por akcidento: ŝ 2500.— je mo
kaj ŝ 5000.— je daŭra invalideco;
II. sfr. 4.55 a) je ŝ 1000.—, b) ŝ 5000.—
ŝ 10.000.—.
Mendokajpagokun la kongreskotizoaLK

La ĉapelo **„Esperanto"** el la fabriko
Carl Ceschka & Söhne,
Wien, VII., Kaiserstraße 123.

La tramvojo al **„Pöstlingberg"** en Lin

La termejo **„Warmbad Villach".**

„Aŭstria Festo je honoro de Bruckner"
Linz - St. Florian, 18.—21. VII. 1936.

Bad Ischl, la plej frekventata salbanlo
en Aŭstrio.

Hotel de France, Wien, I., Schottenring
Tel. A-17-5-75. Unuaranga familia hote

Venu ankaŭ vi al la fabele bela, m
multekosta **Steiermark.**

KÖB, aŭtobusentrepreno de Oesterr. B
desbahnen, Wien, II., Nordbahnstraße, No
bahnhof.

Oesterr. Automobil-Fabriks-A.-G., anta
„Austro-Fiat", Wien, XXI.

Ripozejo **„Maria Rast",** Schruns, Vora
berg.

Schruns: Hotelo Taube-Post, pensio
Edelweiß, kafejo Alpina, ŝpar-kaj pruntkas

Montafoner-fervojo Bludenz-Schruns.

Firmo **Ceschka & Söhne** en Wien, fabrikan
de ĉapelo „Esperanto" jam ricevis sekve
anonco en AE mendon el Svedujo. Esper
multaj sekvos.

Kongresanoj!

Ni rekomendas aliĝon al asekuro ĉe
oficiala instituto „Der Anker". Premiopa
ege malalta: Aliĝilo aldonita!

Solvo de la enigmo el n-ro 3.

1. revizisto, 2. pantalono, 3. varmega, 4.
preoloj, 5. kornico, 6. ligohimno, 7. inform
8. semaforoj.

Aritmogrifo.

De Karl Haager, Wien.

1, 2
10, 14, 10, 13, 3, 5, 3, 2
14, 6, 8, 7, 13, 15, 11, 2, 1, 2
3, 5, 6, 9, 15, 13, 11, 5
10, 13
13, 11, 12, 13, 15, 2, 6, 4, 5
13, 6
7, 8, 13, 6, 5

Anstataŭ la ciferoj oni enmetu la konven
literojn; la solvo rezultigos por la tuta esp
antistaro rimarkindan okazintajon.

Eigentümer, Herausgeber und verantwortliche Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. **Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII.,** Bandgasse 28.